nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2024

## RAPORTO DE LA ABUNDAJ APRILAJ AGADOJ

Kiel ni anoncis en la pasinta numero, aprilo plenplenis pri agadoj rilataj al Esperanto. En tiu ĉi eldono ni inkludas mallongan bilancon, kun kelkaj fotoj.

La 1-an de aprilo, okazis la poezia recitalo kun prezentado de la poemaro *"A Cabeleira (Poema en 70 idiomas)"* de Claudio Rodríguez Fer, en la *Casa de Galicia* en Madrido. La version en Esperanto tradukis Diana Conchado, profesoro en la Nov-Jorka Universitato. Mati Montero zorgis pri la deklamado en nia lingvo, kiu estis la ora fina parto de la evento, post prezento fare de la aŭtoro mem, plena de admiro al Esperanto kaj al la humanismaj progresemaj valoroj al ĝi asociataj.



La sabaton 13an de aprilo dek esperantistoj, inkluzive de la ses-jara Luis, marŝadis tra la montaro per facila vojo en la areo nomata La Barranca ĝis la rigardejo Las Canchas, ĝuante belan pejzaĝon kaj bonan veteron. Poste ili bierumis en la apuda vilaĝo Navacerrada.

La 19an de aprilo, kadre de la institucia aranĝo *La nokto de la libroj*, en la sidejo de MEL la poeto kaj tradukisto Miguel Fernández prelegis hispanlingve pri la verko de Lorca "La casa de Bernarda Alba", ĝia traduko al Esperanto kaj ŝlosiloj por ĝia plena komprenado. La prelego estis realtempe elsendita per YoutubeLive kaj espereble ĝi estos baldaŭ publike spektebla per la ligilo: https://www.youtube.com/esesperanto.





La 24an de aprilo du samideanoj, Yasna kaj Marcelo, laŭtlegis pecojn de Don Kiĥoto en Esperanto en *Círculo de Bellas Artes*, kadre de la sinsekva legado de tiu verko okaze de la Tago de la Libro. Kiel tradicie, la organizantoj de tiu aranĝo varme akceptas nian partoprenon.





**nia voĉo** **majo 2024**

## NOVA LIBRO DE MIGUEL FERNÁNDEZ




Ankaŭ okaze de la Nokto de la Libroj la eldonejo Lastura anoncis la aperon de nova libro de Miguel Fernández, kun titolo "La palabra y el viento". Kvankam en la hispana, la libro estas prezentata kiel produkto de la E-literaturo (temas pri kvin noveloj el "La vorto kaj la vento").

La libro estos akirebla en la librovendejoj ekde la 30-a de aprilo, kaj estos prezentata publike baldaŭ (eble jam fine de majo). Ni informos pri la detaloj per la kutimaj kanaloj. Dume, oni povas trovi informojn kaj akiri ĝin en la retejo: https://lasturaediciones.com/product/lapalabrayelviento/.

## RAPIDU: LIMDATO POR LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Atentu: la 30-an de aprilo finiĝas la limdato por plej rabatita kotizo al la 82-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazos en la valencia urbo Cheste, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro.

Jam aliĝis pli ol 50 personoj, el proksimume 13 landoj. La aliĝilo troviĝas en la retejo: https://kongreso.esperanto.es/, kie ankaŭ aperas informoj pri programo, gastigado, manĝado, kaj postkongresa turismado.

## FORPASIS RODRIGO VAQUERA

Ni bedaŭras informi ke la 11-an de aprilo forpasis nia samideano Rodrigo Vaquera Márquez, 70-jara, sevilano loĝanta en Madrido de antaŭ multaj jaroj. Li ŝategis lerni lingvojn kaj estis tre fervora esperantisto ekde sia juneco. Ni kondolencas lian familion kaj amikojn.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ



Ni kunvenas denove ĉiulunde de la 18,30 en la sidejo. La riparoj, pri kiuj ni informis en pasintaj numeroj, jam finiĝis, kaj nun la sidejo montriĝas pli altira kaj belaspekta. Dankon al la skipo kiu zorgis pri la organizado, ordigo kaj purigado (apude dum siaj laboroj).

La sabata kunveno okazos ne la unuan sabaton (pro la feriponto), sed la 11-an de majo, je la 18:30, ĉe Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

## SOCIAJ RETOJ KAJ RETEJOJ

Ekzistas grupo de ŭacapo (whatsapp), sufiĉe aktiva, por la madridaj esperantistoj. Vi povas aldoniĝi al la grupo per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com